

Leterkesto
Claude Gacond, 368-a radioprelego, 1970.10.28 & 31

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Revenis la momento malfermi nian leterkeston kaj konversacii dum tri elsendoj kun niaj geaŭdantoj.

A.- Dum la pasintaj monatoj salutis geaŭdantoj el Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Francio, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Svislando kaj Svedio, do el 15 eŭropaj landoj.

Cl.- Se vi loĝas en lando ne menciita, kial vi ne prenu plumon por foje skribi al Radio-Svislando, ke vi aŭskultas la esperantan programon ? Tiel ni havos la okazon vin saluti dum la venonta babilado kun niaj geaŭdantoj, kaj ni scios, ke vi ekzistas.

A.- Tiun ĉi fojon ni ordigis la ricevitaĵojn laŭ la alfabeto ordo. Ni salutos vin laŭ tiu ordo iomete stulta, sed por ni sufiĉe agraba.

Cl.- Do unue alvenas Belgio. Ni salutas sinjoron Jo Haazen en Antwerpen, kiu ŝatas niajn prelegojn.

A.- Multaj leteroj kaj poŝtkartoj venis el Britio.

Cl.- Sinjoro F. Blunden en Londono skribas:

A.- « Aŭskultante viajn voĉojn en mia hejmo ĉiumerkrede, mi sentas kvazaŭ mi konas vin persone. Kvankam mi parolas por mi mem, mi estas certa, ke mi nur diras tion, kion aliaj pensas. »

Cl.- Ankaŭ ni havas la impreson vin persone koni, dank'al viaj regulaj mesaĝoj. Kaj, malfermante tiujn konversaciajn momentojn kun niaj geaŭdantoj, ni deziras permesi al vi ĉiuj pli kaj pli formi specon de perradia amika rondo.

A.- Ĉiam el Britio skribis gesinjoroj John Brownlee en Upminster. Kiel multaj aliaj geaŭdantoj ili ŝatis nian prelegaron pri Hector Hodler :

Cl.- « *Ni scias malmulton pri Hodler kaj ŝatus aŭdi plu.* »

A.- Tiuj diroj nin kuraĝigas daŭrigi la sisteman studadon de la vivo de tiu esperanto-pioniro. Dum la monato novembro ni revenos al tiu studotemo per nova prelegaro, kiu daŭros dum la vintraj monatoj.

Cl.- Ĉiam el Britio ni ricevis multajn amikajn leterojn de sinjoro B. Najbaro en Keighley. Kiam li kuŝis en la hospitalo por operacio, lia edzino registris niajn prelegojn, tiel li povis ĝui pri la karikaturado de Julio Baghy *La propagandisto*, kiun ni aperigis en *Svisa Espero*. Kun plezuro ni sendas al li, kiel al ĉiuj mendintoj, tiun numeron de nia svisa gazeto, kie troviĝas la karikaturado de Julio Baghy.

A.- Al la blasfememuloj sinjoro B. Najbaro donas interesan informon. Aŭdu :

Cl.- « *En la hospitalo mi komencis legi **Quo Vadis** en traduko de Lidia Zamenhof. [...] Mia opinio estas, ke se iu deziras lerni kiel blasfemi en esperanto, ĉi tiu estas la ĝusta libro por tio.* »

A.- Ricevinte kiel pluraj petantoj ekzemplerojn de *Svisa Espero*, li deziras scii, ĉu ni estas la redaktoro de tiu gazeto.

Cl.- Jes, depost junio 1969 ni transprenis tiun kompleksan taskon redaktadi tiun monatan revueton. Ni provis modernigi tiun organon de Svisa Esperanto-Societo, por ke ĝi iom post

Leterkesto
Claude Gacond, 368-a radioprelego, 1970.10.28 & 31

iom fariĝu la informilo de ĉiuj esperantistaj societoj kaj grupoj en Svislando. Samtempe ni iniciatis kampanjon por senpage dissendi tiun gazeton al ĉiuj esperanto-gelernantoj de Svislando, tio dum tuta jaro.

A.- Tiu kampanjo montriĝis sukcesa. Jen tiurilate kion ni raportis en la septembra monata cirkulero de Kultura Centro Esperantista :

Cl.- « *Enketo pruvis, ke ĉiujare minimume cent personoj lernas esperanton en Svislando, sed ke nur 4 aŭ 5 procentoj el ili aliĝas al la esperanto-movado, tio ĉefe pro manko de informado pri la esperanto-vivo. Tiam ni organizis kampanjon por senpaga dissendado de **Svisa Espero** dum tuta jaro al ĉiuj esperanto-gelernantoj, kies adreson ni ricevas. Tiu kampanjo montriĝis kuraĝiga. Jen ĝiaj rezultatoj :*

A.- En februaro neniu persono profitis pri tiu agado.

*Cl.- En marto jam 41 personoj senpage ricevis la gazeton **Svisa Espero**.*

A.- En aprilo ili estis 49.

Cl.- En majo 64.

A.- En junio 104.

Cl.- En julio-aŭgusto 169.

A.- En septembro 185. »

Cl.- Kaj nun ili preskaŭ estas 200. Tio pravas, ke multaj personoj lernas esperanton. En venonta elsendo ni revenos al tiu agado, ni citos erojn el la cirkulero, kiu akompanas la unuan ekzempleron de **Svisa Espero** kaj kiu bonvenigas tiujn gelernantojn en la esperanto-movadon. Sed ni revenu al niaj geaŭdantoj.

A.- Ĉiam en Britio skribis sinjoro Henri Palmer en Bristol, li deziras scii, ĉu sub la esprimo gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond ni volas diri, ke ni estas geedzoj aŭ patro kaj filino ?

Cl.- Ni estas geedzoj.

A.- Ĉiam en Britio gesinjoroj Alice kaj Walter Peake en York senpacience atendas la rekomencon de la prelegaro pri Hector Hodler.

Cl.- Ĉiam en Britio sinjoro R. A. Ruston, prezidanto de Keighley Esperanto-Societo, nin avertas, ke la esperantistoj en Keighley foje grupe aŭskultas registraĵojn de niaj radio-elsendoj.

A.- Ĉiam en Britio sinjoro Ken Sly en Letchworth interesiĝis pri nia prelego koncerne la programitan instruadon. Kiel pluraj aliaj geaŭdantoj li petis ekzempleron de la unua leciono de la kurso, kiun ni nun programas por franclingvanoj. Kun plezuro ni hodiaŭ sendas tiun lecionon al ĉiuj petintoj.

Cl.- Se vi deziras ricevi la aliajn lecionojn, vi respondu al la finleciona testo kiel simpla lernanto, kaj aŭtomate vi ricevos la sekvan ĉapitron. Kiel esperantisto vi povas esprimi kritikojn. Ili estos al ni utilaj por plibonigi la definitivan tekston.

A.- Ĉiam el Britio fraŭlino Hilda Tharme en Bangor sendis informojn pri la asociiĝintaj lernejoj.

Cl.- « *Nuntempe 666 lernejoj kaj kolegioj en 58 landoj partoprenas tiun agadon. Ili interrilatas, post elekto de komuna studtemo. Kelkaj lernejoj uzas esperanton por tiu laboro.*

Leterkesto

Claude Gacond, 368-a radioprelego, 1970.10.28 & 31

Ekzemple la infanoj de Deiniol School en Bangor, la urbo de fraŭlino Hilda Tharme, amikiĝis kun gekamaradoj de multaj landoj kaj lernas pri iliaj ĉiutagaj vivoj uzante nur esperanton.

A.- La instruistoj, kiuj ŝatus partopreni tiun agadon kun siaj gelernantoj devas sin turni al la Nacia Komisiono de Unesko en la koncerna lando. »

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-